

Nova Provo

Organo de NOVO, Asocio por Komuna Ellaborado de Lingvo Internacia
Numero 8 Februaro 1995

*Tre estimataj membroj de NOVO,
tre estimataj esperantistoj,*

Ĉi-numere mi transprenas la ĉefaktivan rolon de Novo. Unue bonvolu permesi al mi difini starpunktojn. Mi estas esperantisto kaj mi estas fidela al la Fundamento de Esperanto kaj Akademio de Esperanto. Esti kaj tia kaj ano de Novo harmonias, ĉar restas malgraŭ ĉio multege da spaco por Novo. Kiel? Tiel:

(1) Estas amaso da proponoj kadre de la oficiala Esperanto. Ekzemploj povas esti pliaj personaj pronomoj (i.a. hi, ŝi, ĉi), participoj je -unt- kaj -ut-, nedeklinataj nombroj trans 1000 . . . kompreneble liste laste nova aŭ ŝanĝita aŭ pligrandigita alfabeto. Oficialigi tion nur povas la Akademio de Esperanto kadre de la Fundamento, sed Novo kiel ĉiuj esperantistoj rajtas proponi kaj diskutadi kaj taksu necesecon. Novo kiel ideoliveranto al la Akademio. Ĉar: se al la Akademio de Esperanto io estas "efektive necesa", ĝi rajtas enkonduki tion en nian lingvon. Ekzemplo estas la nedeklinata nombro nul en la 8-a Oficiala Aldono. Same ekzistas tre tre malnova Akademia deklaro pri -aŭ.

(2) Kelkaj proponoj kaj ankaŭ nova aŭ ŝanĝita aŭ pligrandigita alfabeto povus ekzisti paralele. Ni pripensu tion. Mi jam aŭdis, ke kelkaj uzas la nombron "sis" telefone por ne konfuzu la similajn ses kaj sep. Sed tio nur estas buŝa varianto. Alia ekzemplo estas la kemia nombrosistemo por elementoj kun atomnumero pli granda ol cent: nil, un, bi, tri, quad, pent, hex, sept, oct, em. La mallongigoj: n u b t q p h s o e. La 106-a elemento do nomiĝas "Unnilhexium". Kiel traduki? (a) Ni povas simple preni pere de la 15-a Regulo: unilheksio. (b) Aŭ ni traduku per la Fundamenta nombrosistemo plus -io aŭ -iumo: jen ununulsesio aŭ ununulsesiumo. Tiusolve la Esperantaj nomoj ne plu kongruas kun la sistemo laŭ la supre menciitaj mallongigoj: la 106-a elemento havas la simbolon internacian Unh. La Esperantaj mallongigoj estus "n,u,d,t,k,k,s,s,o,n". Unue tio ne estas la internacia sistemo, kaj due tio ne taŭgas, ĉar n = 0 kaj 9, k = 4 kaj 5, s = 6 kaj 7. Ĉu "Unk" estas la 104-a aŭ la 105-a elemento? (c) Ĉu enkonduki paralelajn nombrojn nur por la sciencoj? 2 = bin, 5 = pent aŭ penk, 6 = heks, 9 = enaŭ? Ili ankaŭ servas en la matematiko: pentagono, heksagono, sepagono, okagono, binaria.

(3) Novo jam povas prepari ŝanĝojn por post la fina venko. Ni legu tiun ĉi frazon el la Fundamenta Antaŭparolo: "Kiam nia lingvo estos oficiale akceptita de la registaroj de la plej ĉefaj regnoj kaj tiuj ĉi registaroj per speciala leĝo garantios al Esperanto tute certan vivon kaj uzatecon kaj planan sendanĝerecon kontraŭ ĉiuj personaj kapricoj aŭ disputoj, tiam aŭtoritata komitato, interkonsente elektita de tiuj registaroj, havos la rajton fari en la fundamento de la lingvo unu fojon por ĉiam ĉiujn deziritajn ŝanĝojn, se tiaj ŝanĝoj montriĝos necesaj; sed ĝis tiu tempo la fundamento de Esperanto devas plej severe resti absolute senŝanĝa, ĉar severa netuŝebleco de nia fundamento estas la plej grava kaŭzo de nia ĝisnuna progresado kaj la plej grava kondiĉo por nia regula kaj paca progresado estonta." Novo povas prepari

tian estontan komitaton aŭ jam pli detale pridiskuti ĝin. Mi tiu probleme rekomendas la librojn Kontribuoj al la norma esperantologio de Helmuto Velger, precipe pro la tieaj ĉapitroj pri la unuopaj konstituciaj decidorganoj de la esperantistaro.

(4) La laboro de Novo eble montros, ke Esperanto estas (iel) perfekta aŭ almenaŭ plej perfekta el ĉiuj lingvoj. Kaj do neŝanĝenda. Tio ankaŭ estas rezulto. Eble Esperanto estas tia ĉefe pro la nekunordigebleco de la plej diversaj proponoj. Ekzemplo: se oni ne povas interkonsenti ĉu *z ĉu zh ĉu jj ĉu nova litero 3 ĉu ĉu ĉu*, tiam oni gardu la nunan *ĝ*. Ĉi tie estas loko por kelkaj demandoj al AEIOU kaj la disĉiploj de la nun morta Jon Walter Yung: ĉu Esperanto estu plejble perfekta aŭ kopio de kutimoj ja internaciaj sed ne taŭgaj? Ĉu oni tuj kapablu rekoni tekston en tiu unika internacia Internacia Lingvo kun ties aparta alfabeto aŭ ĉu ĝi estu kiel iu ajn lingvo sen povi distingiĝi?

(5) La plej radikala estas la lasta el tiuj ĉi kvin tieloj. Ni fajfu pri la oficiala Esperanto kaj do tute pri Esperanto, kaj ni kuiru nian propran kaĉon. Sed tion ni faros ekster Esperanto tiurole ne plu estante esperantistoj. Kelkaj el ni devos vivi duoblan vivon: jen esperantisto, jen novisto.

Ĉiukaze ni klare deklaru niajn intencojn: (1) versio NI PROPONU, (2) versio NI PARALELU, (3) versio NI PREPARU, (4) versio NI LASU, (5) versio NI FAJFU.

Nove, kore kaj amike
Claus J. Günkel (Nikolao J. Gunkel)
Postfach 10 04 47
DE-41704 VIERSEN, Germanio

Komenci per simplaj ŝanĝoj

Ĉe la ŝanĝo de la gvidantaro en Novo ni devas danki s-ron McCoy. Li forigis la tabuon sur reformoj. Tio estis konsiderende granda faro. Kvankam la rezulto ne venis tiel rapide kiel li verŝajne atendis, la interŝanĝo de ideoj kontinuas.

Ĝis nun neniu interkonsento estas atingita, bedaŭrinde. Kial ni ne preparolas *tre simplajn* ŝanĝojn, kiel komencon? Estas ne necese ke ni mem elpensu ilin. Zamenhof jam proponis kelkajn.

En 1894, post ricevo dum la antaŭaj sep jaroj de ideoj fare de la unuaj esperantistoj, li publikigis plurajn proponojn por ŝanĝo en sia gazeto *La Esperantisto*. La legantaro rajtis voĉdoni pri ili. El tuto de ĉirkaŭ 1000 legantoj nur 264 partoprenis. El ili 157 montris sin kontraŭ ĉiuj reformoj. Do 107 volis unu aŭ pli da ŝanĝoj.

Kelkaj el la zamenhofaj proponoj estis radikalaj, aliaj ne. Al la lastaj apartenas: *forigo de akuzativo kaj forigo de akordo*. Tiuj ŝanĝas la lingvon nur tre malmulte.

Zamenhof diris pri la akuzativo, ke ĝi “de unu flanko prezentas grandan malfacilaĵon al multaj personoj kaj de la dua flanko kontraŭparolas al la komuna spirito de nia lingvo, kiu havas deklinacion nur per prepozicioj. Ke lingvo

povas ekzisti tre bone sen akuzativo, tion ĉi ni vidas en diversaj civilizitaj lingvoj, kiuj havas akuzativon aŭ nur en certaj kategorioj da vortoj aŭ tute ĝin ne havas. Sekve: la akuzativo estu egala al la nominativo. Por eviti malkompreniĝon kaj konfuzon inter la nominativo kaj akuzativo, ni povas konsili (ne devigi) al la komencantoj, ke ili metu la nominativon ĉiam antaŭ la verbo kaj la akuzativon post la verbo; sed fari el tiu ĉi ian regulon kaj malliberigi la ordon de la vortoj en la frazo ni tute ne bezonas, ĉar la logika sento kaj kelka kutimo facile donos al ĉiu la eblon eviti malkompreniĝojn. Eraroj en la uzado de la akuzativo apartenas al la plej oftaj, kiujn la komencantaj Esperantistoj (kaj ofte ankaŭ la Esperantistoj malnovaj) faras, kaj la forigo de la akuzativo prezentos grandan faciligon por la lingvo.”

Pri la akordo Zamenhof skribis: “Deklinacion ili [la adjektivoj] he havas, ĉar ĝi estas superflua balasto, kaj sufiĉas, se la deklinacio ekzistas ĉe la substantivoj.”

K. RIEMERSMA, Nederlando (ric. 8.1994)

Pri germanaj radikoj en internacia lingvo

Jam la projecto “Interlingua” el Swissia borritz cziujn (ómniajn sen resto) Germanesagjoin el la línguo projecto internaciana, cai tio *tutcerte*

ne sole pro la stylrompo sze envenuz rádicoi Germanesai en línguon majoritate Romanan, sed edí pro la crimoí perpetritai Germana-flanqe en la guerro mundiala segunda.

Jam 2-3 ánnuoin nyin est preta la editagio “Neologío” *por Linguna*, al qvi nyin additidsis (prae 1 ánnuo) la editagioi “Exgermán” cai “Antígermán”, por qvío — compreneble oni povas trovi ancorau pli neutralan titolaron!

Szamentpe, reqa oni mencionis la crimoín de Unitai Estatoí de Nordamérica (UEN), mi povas confirmi, qve *parto* de la Djermanai rádicoi trovísintai en Oldesperanto el deveno Anglesa vanuiz en Linguna. — Qvau qío? Nuj, tio est qvau Helleneso, Bulgareso-Russesó, Italeso, rarofoaje Hispaneso, cai Franceso, edí iuj rádicoi dilluvialai Indo-Europesai, al qvi ja *ancau* appartenaz rádicoi Djermenesai: do en tiu protoform, prae la Djermanai pópoloi, povas apperi tiuj!

Czia cultur nacionala est dubinda. Mi ne laicas poemoin declamantain generaloin qvi cunlaboraz cun fashistoí.

La pópoloi Romanai, la pópol Hellená cai pópoloi Russa, Bulgara, Slava, Slovaca, Slovena, Croata ctp., illi cziuj, prime, tute ne tiomqvante cai tiomqvalitaje crimiz en militoi qviom la Germana; segrade, cze Romanoí exemple, illi eccogniz pri suai crimfaroí specifai cai mudariz dum la curro de la historío, sed ne ancorau volaz minorigi — deposte — suain perpetragjoín qvasi tiuj éstizu io normala, cai illi ancau ne ricommencas novain pogromoin edc. — La Germana línguó mejas esti bella línguó como tía, sed ne en Linguna, la nova Esperanto! Tion cetera la Germanoi mem ne laicaz!

Enqetoi faritai me riveliz qve Germanoi epí 99,98% dislaicas rádicoin Germanesain en Esperanto, qviun cetera epí 90,05% entute dislaicaz cai favoraz Angleson qvie rádicoi Djermanai énazu pli bonan ambienton ol en Esperanto qvie, seqvum illi, la rádicoi Djermanai lohsentúmazu! Concerne la stocasticon pri Germanois praefero de línguoi cai pri ties (cai ne sole tiuj, ancau exteranejrois) recuso de Esperanto (olda) generale cai ties nausidso rigarde rádicoin Germesain ac Djermesain trovísintain en Esperanto (olda), mi povas enmeti la sperton de mia tuta vito cai zaman sperton de multe da áliai esperantistoi (mi est esperantisto ecde 1951, hódie nombras aedon de 59 ánnuoi). La 9,95% resp. 0,02% de mi qvau la Germanoi est pure inventitai, envere la

refuso est plorinde 100%a. Sze la Germanoi dynuz, illi 150% discruuz Esperanton (malnovan), sed felice illi ne nombrá pli 100%, qviom ain ancau laicuz esti pli grandai cai multai!

Ostavúdem la Germanoin cai loran laiqemon cai praeferadon orgoilain, la historío de nyin marshas sen illi aván. Cetera Germanai poetoí cai inventistoi ómniai issar (estadis) unopuloí, saepe recusitai del pópolo propra, multafoaje elmoqitai, pricricazitai cai ecz persecutitai! Ostavúdem la Germanoin por cziam el nostra pripensso, illi ne valoraz la penon. Illi czion “pli bone esciaz”, illi “cziam aro senculpai”, illi czian “solmentau voliz la plej bonan”. Jes, tutcerte! Do ostavu illin en morta paz!

Hans Dito GOERES, Germanio (ric. 8.1994)

La angla modelo

La angla língvo ne estas facile lernebla, dji havas ekz. 12 vokalfonemoyñ kay multayñ diftongoyñ. Dji ne estas fonetika, la elparolo de preskau çiu vorto oni devas aparte lerni ktp. Tamen la iniciantoyñ sukcesis çar ili laboris lau agadprogramo. Al la tuta scienca, teqnika, komercajo ili aldonis angle skribitayñ uzinformiloyñ kay tiel ili devigas studi ilian idiomon. Cetera kantistoyñ en multayñ landoyñ varbcele kantadis angle kay komercistoyñ vendadas T-çemizoyñ kun anglay surskriboyñ ktp.

Ekkono. El la angla ekzemplo ni tre bone ekvidas, ke la sukceso de língvo unuavice dependas de djia praktika uzebleco en la çitaga vivo krome de la mono, de la lerta varbado kay de vasta popolo. Se ni vere volas havi sukceson, ni devas esti multe pli aktiva sur çiyu kampoyñ de la moderna vivo. Ni devas evoluigi strategian planon kay realigi kun amo. Ye pli da esperantistoyñ despli kreskas nia influo, la memkonscio, kay la kuradjo. Reformetoyñ nur estas utilay, se ili estas pruvitay en la praktiko kay trovos komprenon çe esperantistoyñ.

La varbado. Por varbi ni devas havi ion por prezenti en monstro-fenestroyñ. Ekz. serio da allogay, belaspektay libretoyñ pri scienco, teqniko, komerco ktp. Tiel ni konvinkas, ke Esperanto estas nuntempa. Tiay faklibroyñ krome faciligus en industrio kay komerco Esperante interpreti pri komputiloyñ, pri elektronikay direktiloyñ de maxinoyñ, pri la diversay aparatoyñ kay agregatoyñ; krome tiay faklibreyñ helpus skribi modelayñ raportoyñ kay komercayñ leteroyñ ktp.

Antaulaboro. Por plene asimili nian língvon al la moderna tempo, pley bone estas traduki

koncize instrukciojn, uz-informilojn, tekstojn el scienco, teĝniko ktp. Samtempe ni povas elprovi reform(et)ojn. Tiel nia laboro pli kaj pli alprenos praktikajn formojn kaj iom post iom montridjós la eblecoj verki modernajn faklibretojn. Bona laboro vekas konfidon.

Aliaj ideoj. Interesa povus esti: libreto kun ekzemploj de medicinaj uz-informiloj. *Celo*, kuradjigi farmaciajn entreprenojn aldoni al siaj produktoj ankau modele skribitajn informilojn en Esperanto. Bonaj tradukoj de diversaj medicinaj uz-informiloj povus esti bona antaulaboro.

Alia temo. Tio ne rekte tuxas nian lingvon, tamen dji povas esti utila. Mi pensas al nova Esperanta Fonetika Internacia Alfabeto kun pli da avantadjoj ol la djis nuna internacia fonetika alfabeto, ĉar dji estas vicigita lau la modelo de la science bonorda hindia alfabeto. Dji ebligas fari multe pli facile komparojn inter literoj kaj elparoloj de diversaj lingvoj. Ni rigardu Esperanton kiel la veran centron de ĉiuj monday lingvoj.

Reformoj. Nun mi tre mallonge mencias kion mi yam foye skribis por listigi kune kun proponoj de aliaj samideanoj. La praktika provado kaj uzado iom post iom montridju kio konvenos.

1) Alfabeto. $j = y$; $\hat{j} = \acute{j}$; $\hat{g} = \acute{d}j$; $\hat{s} = x$ (lau la ĉina); $\hat{c} = tx$ au \acute{c} (lau la turka); $\hat{h} = q$ (similas); \hat{u} post vokalo en silabo ĉiam estas mallonga, do \hat{u} restu u . La vokaloj $\hat{u} = w$ kaj $\hat{o} = \emptyset$ utilas por indiki la elparolon de fremdvortoj.

2) Pli belaj vortoj kaj bonaj tradukoj ekz.: *sivo* (kribriilo), *hano* (krano), *gambo* (kruro), *konti* (kalkuli), *sundio* (dimanĉo), *pedpilko* (futbalo), *destra* (dekstra), *espluati* (ekspluati). Pley dezirindaj estus bonaj tradukoj de la teĝnikaj fakvortoj kiuj estas konatay preskau nur en la angla lingvo.

3) Malvortoj. Vortoj kiel *malbona*, *malafabla*, *malsana* k.s. estas tute en ordo, sed vortoj en teĝniko bezonas apartajn nomojn, ekz. *kurta* (mallonga), *ofa* (malferma), *dwna* (maldika), *dope* (malantaue) ktp.

4) Gramatikaj rimarkoj. En la angla lingvo la adyektivo ne kunfaras la kaz- kaj la plural-fleksion de la substantivo. La turka lingvo ne uzas la pluralformon de la substantivo se nombro yam indikas la pluralon, kaj la akuzativo en Esperanto havas veran signifon nur ĉe pronomoj kaj por indiki la direkton. El tio ni vidas, ke ekzemploj de deziratay xandjproponoj yam

estas troveblaj en nacilingvoj. Reformetoj en tiu maniero nur povus iom faciligi nian lingvon sen malhelpi la komprenon. Ekz. sufiĉus skribi: *kostas 5 Mark; la aparato indikas 100 Volt; pezas 3 kilo; 37 grad(o) Celsius* ktp.

5) Verboj en prezenco sen la finaĵo -as igus frazetojn pli fluaj kaj belaj sen malhelpi kompreni. Geyunuloj tre xatus tion. Aplikado libervola. Ekz.: *Mi est preta; Ĉu vi vol vidi?; Li hav la pilkon; Xi dezir havi* ktp.

Konkludo. Se ni volas havi sukceson ni devas evoluigi programon kiu promesas prosperon por Esperanto, ĉar tio kuradjigas. Ni sekvu la ekzemplojn de la anglaj konkurantoj, tiel ni povas akiri atenton ĉe la esperantistaro kaj ni esperu realigi kelkajn bonajn reform(et)ojn.

Walter KOBELT, Svislando (ric. 8.1994)

La paronimoj en Esperanto

En Esperanto ekzistas vortoj kaj literoj kiuj havas tre simila sono. Tio povas okazigi miskomprenoj, kiuj povas esti danĝeraj kiam la lingvo estu uzata por seriozaj aferoj kaj ne kiel ĝis nun ke oni uzas nur kiel hobio.

Sro Werdin en NP 4 paĝo 36 konsideras simile sonantaj *ij*, *c/ĉ*, *s/s*, *z/ĝ/f*, *r/l* kaj *u/ŭ*. Kelkaj el tiuj problemoj estas facile solveblaj, sed aliaj — kiel ekzemple *lr*, kiuj estas tre uzataj — bezonas grandaj ŝanĝoj en la lingvo.

Mi proponas ke la litero *z*, kiu estas malfacile prononcebla, prenu la sono kiun ĝi havas en la itala kaj kastilia lingvoj, kaj kiel la angla *th* en la vortoj *thing*, *thong* aŭ *thunder*. La prononco estas ege facila: oni apogas la lango sur la superaj dentoj kaj prononcas. La aero fluas per ambaŭ flankoj de la lango, kaj je prononco de *a* aperas la sono *za*, de *e* aperas la sono *ze* ktp. Provu vi mem. Tio estas uzebla ne nur ĉe la vortoj kiuj nun havas la litero *z*, sed ankaŭ por ĉiuj literoj kiuj nun oni skribas per *c*, kies nuna sono malaperas. Tio okazigos neniu problemoj, ĉar la litero *c* estas uzata nur por vortoj kiuj havas la silaboj *ce* kaj *ci*. La silaboj kiuj en nacia lingvo estas skribataj *ca*, *co* kaj *cu* estas skribataj *ka*, *ko* kaj *ku*. Pro tio la ŝanĝo ne faras novaj paronimoj. La litero *c* prenas la sono de \acute{c} kaj la nuna sono de *c* malaperas.

Uzante *z* por la finaĵo de la verboj anstataŭ *s* (t.e. *amaz*, *amiz*, *amoz* kaj *amuz*), oni povas fari la pluralo per *s* sen problemoj. Ekz. “La libros estaz sur la tablo”. La akuzativo, kiu preskau malaperos se oni akceptas mia propono “Pri la troa uzado de la akuzativa finaĵo -n”,

povas esti skribata en pluralo per *-ns*. Ekz. “Maria doniz la du hundetons al Karlo”.

La litero *ŝ* oni skribos per *x*. Ankaŭ oni skribos per *x* la paroj *ks* kaj *kz* escepte la vorto *ekzema*, kiu devas resti sen ŝanĝo. La sono *ŝ* malaperas. Mi insistas ke la paro *kz* estu ankaŭ *x*. En la Universala Vortaro aperas (Esperante-france-angle): “ekzamen’-examiner-examine, ekzekut’-exécuter-execute, ekzempl’-exemple-exemple, ekzempler’-exemplaire-exemplar, ekzerc’-exercer-exercise, ekzil’-exiler-exile, ekzist’-exister-exist”. Kiuj proponas *xz* devas konsulti vortaroj.

La literoj *ĝ* kaj *ĵ* prenas unu komuna sono *ĵ*; mi proponas skribi *ĝi* per *y*, kiu estas nova litero kaj ne bezonas pluaj ŝanĝoj, kiuj ĝenus al la esperantistoj de landoj kiuj ne uzas latina alfabeto kaj ankaŭ al ni, ĉar uzante *j* oni devas forgesi la antaŭa uzado, kio ne estas facila, kaj lerni la nova sono.

Pluralo per *s* evitas la malbela uzo de *j* aŭ *y*. La vorto *aĝo*, kiu koincidas kun *aĵo*, devas ŝanĝiĝi al *adyo* por eviti miskomprenoj.

La sono *ĝ* malaperas. Tamen oni povas uzi *ĝi* anstataŭ *ĵ* sen problemoj.

En la personaj pronomoj kaj en la korelativa tabelo abundas la paronimoj kun danĝero de miskompreno, speciale en la parola lingvo, pro la brua etoso de la moderna vivo. Ankaŭ la uzo de *vi* por singularo kaj pluralo povas okazigi miskomprenoj. En “tio estas por vi”, oni ne scias ĉu estas por “vi sola”, por “vi ambaŭ”, aŭ por “vi ĉiuj”. Mi proponas jene: *me (mi)*; *tu (ti)*; *vi (vi singulara)*; *lo (li)*, *xe (ŝi)*; *yi (ĝi)*, *si (si)*; *oni (oni)*; *notro (ni)*; *ivi (vi plurala)* kaj *eli (ili)*.

Pri persono	iu	kiu	tiu, ĉi tiu	ĉiu	neniu
Pri koso	io	kio	tio, ĉi tio	ĉio	nenio
Pri kvanto	iom	kiom	tiom	ĉiom	neniom
Pri tempo	iam	kiam	tiam	ĉiam	neniam
Pri loko	ie	kie	tie, ĉi tie	ĉie	nenie
Genitivo	ia	kia	tia	ĉia	nenia

La finaĵo *-a* kun substantivaj aŭ pronomaj radikoj faras la genitivo: *mia* = “de mi”, *patra* = “de patro”, *ora* = “de oro”, ktp. Pro tio ĝi devas havi la sama signifo en la korelativa tabelo. Ekz. “Kia estas la libro? Ĝi estas mia”, “La libro estas ĉiaj (de ĉiuj)”. La finaĵo *-a* povas esti anstataŭigata per la prepozicio *de*. Kun adjektiva radikoj *-a* faras normala adjektivo.

La genitivaj finaĵoj *per -ies* malaperas. La finaĵo *-a* anstataŭas ili.

Mi proponas la uzo de la internacia adverbo *kom* (france *comme*, itale *come*, hispane kaj portugale *como*) por anstataŭi *kiel* kaj la ĝisnuna uzo de *kia*. Kiam *kom* rilatas al la verbo temas pri maniero, kaj kiam *kom* rilatas al substantivo aŭ pronomo temas pri kvalito. Ekz. “Kom vi fartas? Mi fartas bone”, “Kom estas la pomo? Dolĉa”, “Marta estas same bela kom Maria”, “Kom veturas Karlo? Tro rapide”, “Kom veturas Marta? Malrapide kom heliko”, “Morgaŭ mi ne venos, kom vi jam scias”, “Kom estas la rozo? Bonodora”.

La vortoj *fniĝantaj per -el malaperas*. Oni povas diri “En iu maniero”, “Iu maniere”, “Kom ni faros tio”, “En kiu maniero ni faros tio?”, “Kom estas ke vi venas malfrue” Ĉar la aŭtobuso ne venis akurate”. La finaĵo *-el* ne estas bezonata.

La vortoj *fniĝantaj per -al malaperas*. Ĉar oni povas diri “pro iu, pro kiu, pro tio, pro ĉiu, pro nenio, pro io, pro tio, pro kio, pro ĉio, pro nenio” kaj ankaŭ “ĉar”, la finaĵo *-al* ne estas bezonata.

La paronimoj *iom-ion*, *iam-ian* ktp ankaŭ malaperas.

Juan NAVAREÑO, Hispanio (ric. 9.1994)

Kritikoj kontraŭ Novo-proponoj

Mi ricevis ĝis nun tri projektojn pri re-formaĉo de esperanto. Vere, ili entute vundis min profunde pro siaj nekredblaj senrealecoj.

– Tiu Interling de Thomas Wood kiun mi volis ne legi plu, leginte pri la “many English structure words . . . easy to learn”. Amikino mia, studentino pri la angla, trapasis ekzamenon pri la angla lingviko en kiu unu el la demandoj estis “Kiel vi konvinkus ke la angla estas reguleca kaj povas esti lernita sufiĉe bone malgraŭ la ŝajnaj malfacilecoj?” – io tia estis. Elkorpiĝa, ĉu ne? Tamen, restas kelkaj kiuj kredas, ke oni devas tralerni ĉiujn malfacilecojn de la eŭropaj lingvoj, koni ĉiujn delikatajn nuancojn de tiuj ĉar ili estas la reĝaj vojoj al la estonteco, sed plu nun:

– kaj mi devis poste suferi la malfazilayoj de la projekto de Juan Navareño, sed baldaŭ forlasis ĝin ne vidante plibueniĝoj;

– kaj tiu de Robert Alberg kiun mi tralegis multfoje kaj miaj okuloj tutvundiĝis pro la dornecaj vortoj kiaj: “Mi uzas nun provizore la Hebrea-Araba formo ‘v’, sed mi pens ke ne ez saĝa enigi radikoj de ne-Europay landoj, ĉar to pov ovri . . . la pordo por evray specoy de

proponoy de la ‘tria mondo’.” Mi ne estus plu povinta dormi sendinte tion! Nekredeble, mi imagis min estiel indianan revivante la “mal-kovron de Ameriko”, aŭ por pli bone diri la “forŝtelo de sia lando far la maltria mondo”.

Ĉiam kiam mi legas pri nova projekto aŭ propono, mi revidas min kiel mi estis studento pri la latina. Ĉiuj viaj projektoj estas latinecaj, eŭropecaj, arbitrecaj, proprecaj, kaj kiel akordigi proprecajn projektojn, eĉ se ĉiuj estas latindevenaj farataj de eŭropdevenuloj.

Certe, estas malfacilecoj en Esperanto, estas malbelaĵoj en ĝi, kaj plibonendaĵoj abundas. Sed ĉiuj sin kondutas estiel Zamenhofetoj, plenŝtopitaj je fiereco reformi.

Mi estas por la plibonigado de Esperanto, kiu devus esti fareda poiome, ne per tua reformo. La ideo kiu pli plaĉus al mi estus konstante strebi al poioma ŝanĝado de la lingvo.

... Ĉu ni povus imagi enigon de ĉinaj, afrikaj vortoj kiel prefiksoj kaj radikoj? Ĉu vere nia lingvo estas internacia aŭ ne? Ĉu nia lingvo devas esti malferma lingvo por la tuta mondo aŭ eŭropdevena paŭsaĵo, netoleranta ekster-eŭropajn trajtojn. Nia lingvo restas plu mirinde eŭropeca, malgraŭ sia tutmonda disvastiĝo. Ĉu Esperanto estas plia ilo por okcidentaligo de la mondo? Ĉu Esperanto ne estas prefere monda voĉo kiu estas espero por ĉiu popolo aŭdigi sin? Se oni devas reformi ĝin, nepras memori tion ĉi pri ĝia mondedo. Ĝi jam estas sufiĉe bona, justa por ĉiuj mondanoj, kaj nenecesas retroiri al la erao de la imperiaj lingvoj.

Pascal LÉCAILLE, Francio (ric. 6.1993)

El letero

Simpl ortografio esus: ts (tsar); x = sh; tx = ch; j (garaj); dj (bridj); eks (ekstra). Tamen forsan sh/ch/x esus plu generale axeptabl.

Kad on trov la simpl, logikal lingvo qua exist en la prezent Esperanto ed Ido? Me kred yes. Forsan on formas kompromis-sistem de Espo/Ido pos omna yar apart.

On hav “me skribis” e “me skribos”. Konseque me pens ke on povus hav “me is skrib” e “me os skrib” qua es egale komprenebl. Esus mem posibl hav -s plural se dezirat.

Me vid refer al princip di neceso e sufico en artikl da S. R. Dalton. Es mea kred ke on dev aplik la princip al tota lingvo.

Me prefer gramatik di partikl e vort-ordin. Chanj di tal gramatik es facil.

Thomas WOOD, Britio (ric. 8.1994)

Kiel la internaciezo (abrevio INT) estas pli supera ol Esperanto (abrevio E)

E Konservu la viandon, sed ne konservu la viandon.

INT Mentenu an la viando, sed ne konservu an la viando.

E Mi atendis vin ĝis oka horo, sed mi atendis vin nur ĝis sepa horo.

INT Mi atendis an vi gxis oka horo, sed mi espektis an vi nur gxis sepa horo.

E Kvar najbaroj venis al mi, ili loĝas en antaŭa, malantaŭa, posta (= sekva, venonta) kaj antaŭa domoj rilate al mia domo.

INT Kvar najbaroj venis al mi, ili logxas en antawa, derera, neksta kaj preva domoj rilate al mia domo. Notu bone, ke cxiu najbaro logxas en difra (malsama) domo.

E Murdo de homo.

INT 1) Murdo an homo. 2) Murdo fa homo.

E Mi ellasis akvon el tri ujoj, sed ellasis la kvaran ujon.

INT Mi ellasis akvon el tri ujoj, sed omitis la kvaran ujon.

E Ili estas nepagipovaj, sed ne nepagipovaj.

INT Ili estas nepagivolaj, sed ne nepagipovaj.

E La manĝado de la ŝarko de la homo.

INT 1) La mangxado an la sxarko fa la homo.

2) La mangxado fa la sxarko an la homo.

E La forpreno de iu de io de iu.

INT La forpreno de iu an io fa iu.

E Genocido (mortigo de geno? kiu “de”?)

INT Gentocido (- ago per cido an gento).

Mi faras la jenajn du proponojn por la venonta voĉdono: 1) Law mia opinio la internaciezo estas pli supera ol Esperanto. 2) Cxar la internaciezo estas plibonigebla, mi jam volas alpreni an la internaciezo kiel lingvon por Novo.

Fine, aldono-korekto al “La Gramatiketo det Internaciezo” (NP 7). La prepozicioj cxe la pasivo estas de kaj *fa*. De montras ablativobjekton aw ablativ-adjekton, kaj *fa* montras agant-adjekton. Ekz.: Ili estas apartigitaj *de* ni (ablativo). Ili estas apartigitaj *fa* ni (agant-adjekto). Kaj aliaj prepozicioj estas uzataj cxe pasivo. Ekz.: Sendita *al* Parizo. Sendita *per* posxto. Li estis sendita *kun* (*sen*, *anstataŭ*) mi. Do, ne nur la prepozicio *de* estas limigita al pasivo. Sekve, uzi *fa* ne estas kontraŭ la Esperanta fundamento; kontraŭe, tio estas plibonigo an E.

Richard STAHL, Usono (ric. 8.1994)

Recenzo: *Nenio nova el Bensheim*

Rolf Riehm (plumnomo: Mario Pleyer) eljetis plian germanlingvan libron sur la merkato: *UNITARIO 2001, mallonga gramatiko kompare al Interlingvao kaj Esperanto*. Lia propra projekto Unitario ne esence evoluis dum la pasintaj dek jaroj — ĝi daŭre estas amatora miksaĵo de Esperanto, la hispana kaj Interlingvao kun nun iomete pli de la itala. Mankas stabileco kaj apliko. Stabilecon liklopodas atingi per 500 tiel nomataj struktur-vortoj, kiuj regu vortaron konsistantan el la hispana vorttrezoro iom modifita laŭ unuj pli-malpli necertaj reguloj.

Ne estas multe diri pri libro sin mem malkvalifikita, kiu fine nur estas pamfleto kontraŭ Esperanto, kiun Riehm/Pleyer propravorte ne sukcesis lerni. Lia libro estas malobjektiva, nefaka, ja ne malofte diletanteca kaj mensoga. Krome tiu ekstre enmiksiĝema kaj kritikaĉema karaktero Riehm/Pleyer havas enormajn problemojn ĝuste meti komojn en sia germana gepatra lingvo kaj ĝuste skribi poŝtkodojn.

Ĉu lingvo povas kulpi la nekapablecon de ĝia lernanto?

Jen kelkaj citaĵoj el *UNITARIO 2001*. P. 37: “[Ke] oni vane serĉas logikan rilaton en la sinsekvo [de la dek ses reguloj] permesas konkludi, ke Zamenhof kiel juna lernanto jam estis tre konfuza.” P. 37: “Substantivoj, verboj, adjektivoj kaj adverboj en Esperanto estas preskaŭ same skribitaj kaj prononcitaj. Ke ili nur diferencas per unu senakcenta vokalo, oni ne povas distingi en flua parolado.” P. 38: “Se iu havas absolute nenion por diri, li do povas bonege fari tion en Esperanto!” P. 40: “En 1905 la esperantistoj faris Esperanton speco de surogata religio, al kiu per tute sensencaj mistikaj ĵuroj oni donis la nimbon de sakrala relikvo. Per tio Esperanto en 1905 estis solene entombigita . . .” P. 41: “Esperanto hodiaŭ estas ĉefe propagandata de fanatikaj fundamentistoj, kiuj jam delonge perdis ĉiun kontakton al la realeco.” P. 42: “. . . Esperanto fakte funkcias senprobleme, se oni unu al la alia diras nur banalaĵojn en mallongaj frazoj.” P. 44: “La esperantistoj ja asertas, ke ilia lingvo estas tiel facile lernebla, ĉar ĝia gramatiko enhavas nur 16 regulojn!” P. 119: “. . . sed nur kelkaj kapablas paroli Esperanton flue.” P. 121: “Oni do povas opinii fiaskinta la solan aplikon, kiun Esperanto iam ajn spertis praktike.” P. 128a: “Esperanto estas la malplej taŭga lingvo por

servi kiel terminologia ŝlosilo kaj per tio kiel pontolingvo en aŭtomata komputila tradukoprogramo.” P. 140: “Kaze de Esperanto, lingvo estas misuzata por malhelpi interkompreniĝi.”

UNITARIO 2001 el unu vidpunkto estas valora verko, ĉar ĝi montras vastan gamon de eblaj argumentoj kontraŭ Esperanto, kontraŭ Interlingvao kaj kontraŭ ĉiu ajn internacia lingvo: de sensencaj facile refuteblaj argumentoj ĝis pli seriozaj diskutendaĵoj. Unitario mem ne estas solvo, sed ĝi eble helpos trovi solvon aŭ plibonigi jam ekzistantan planlingvon.

La alfabeto de *unitario 2001* rigardata kiel faciligita versio de iu *Unitario 2002* estas kiel la Esperanta, krom kelkaj esceptoj, kiuj kadre de *Nova Provo* estu publikigitaj: ay (aj), æ [ɛ], av/aw (aŭ), c (k), ev/ew (eŭ), ey (ej), nq [ŋ] (kiel n en ng kaj nk), oy (oj), ø [ø], s (s aŭ z), ŝ (z), w (ŭ), x (ĥ), y [y], z/z' (ĵ), ŝ (ŝ).

La numeraloj Unitariaj: sero, una, dua, troja, kwarta, tŝinqkwa, seksta, tŝiiba, otta, nøva, diksi/detsim, tsento.

La personaj pronomoj: ego, tuo, illo (li, ĝi), ella; numos, vøtos, listos; ono.

La adreso: Unitario Press/ECU, Postfach 1825, 64608 BENSHEIM, Germanio.

Claus J. GÜNKEL, Germanio (ric. 10.1994)

Refuto de *misimpreso*

La ortografado, kiun mi prezentis tuje per tekstmodelo en *Nova Provo* 4, impresis al kelkij harstarige revolutsia pro (pretsipe) la multaj o kaj e kun tsediljo (o, Q, Ğ, Ę). Tiuj tŝi estas ja kunformaj al mia sistemo pri Universala Skribo, inventita por trakti *tŝiujn* lingvojn en la mondo per unu sama metodo. Ili respondas al la *norma* pronontso de tiuj parolsonoj en Esperanto, nome al [ɔ] kaj [ɛ] laŭ IFA-notado. Tamen netesas atenti, ke en mia metodo tŝiu lingvo povas kaj rajtas por sia hejmlanda uzo faligi tiajn ortografadajn distingojn, *se ne egzistas interna opono* inter la kontsernaj fonejmoj, sed se tia jes egzistas dži ja postulas ratsie distingi ankaw inter la respondaj literoj. Egzemple la nederlanda tion solvas per duobligo de la vokala litero en vortoj kiaj: *lek* (“liko”) kaj *leek* (“laiko”).

La dirita permeso pri fatsiligo en mia skribo-sistemo sekve validas ankaw por Esperanto mem! En la de mi ellaborita reformizo UNIESPO (Universala Esperanto) la q kaj ĝ do ne *absolute* netesas, tŝar ne egzistas en nia Lingvo

Internatsia opono inter *o* kaj *o* aw inter *e* kaj *e* — law IFA respektive [o], [ɔ] kaj [e], [ɛ]. La solaj restantaj nepraĵoj estas *ŝ* kaj *z* (por traditsiaj *ŝ* kaj *ŝ*). Krome, tiujn tsesdilajn simbolojn oni povas kaj rajtas — kiel transira kaj provizora rimedo — anstatawigi per ajnaj similaĵoj: egzemple per la tie tŝi montrataj tŝexaj *ŝ* kaj *z*, aw lastinstantse etŝ per *sh* kaj *zh*, se la uzata tekst-programo (aw tajpilo) ne disponas la dĵustajn teknikajn rimedojn. La *realajn* normajn pronontsojn de *o* kaj *e* en Traditsia Esperanto, oni tiele povas neglekti, atendante epokon (utopian?) en kiu tŝiuj lingvoj de la mondo kunformiĝos al unu sola komuna, do vere internatsia, skribosistemo en kiu identa pronontso ritsevos ankaw identan litersimbolon kaj inverse.

Miaj kritikantoj bonvolu tsetere rimarki ke tiuj “abomenaj subsignoj” neniel estas diakritaj signoj en la teknika sentso, sed konsistigas integran parton de la kontsernaj literoj. Se oni nepre volas rigardi ilin tiele, do oni nomizu ankaw la kroman strekon de *E* diakritilo por *F*, aw tiun de *G* diakritilo por *C* . . .

Estas dĵuste la apsoluta bezono je multe pli da literoj ol liveras Latino, kiu puŝis ewropajn lingvojn inventi tiom multe da ekstraj literoj kaj literkombinaĵoj — tŝiuj lingvo kompreneble tute nur por si mem, sen konsidero por la aliaj lingvoj, postlasante la nunan priplorindan xaoson. Esperanto ne sekwu tiun malratsian situatsion, sed montru la vojon al ratsiigo kaj unuetsigo . . .

Manuel HALVELIK, Belgio (ric. 9.1994)

Notos de la fondinto

La legantos de *Nova Provo* rimarcon simileso inter la aspekto de avanas numeros e de tiu qi. Tiu simileso ne estan nur coincido. Me ade composton la organo (almene til la nova redactisto havan propra computador e povan/volan fari mem) e reproduccion lo per la samas alfabetos e aparatos ciel avane. Tiu arango — pro tio ce s-ro Gunkel ne povan precize avanvidi la longo de la textos — donon al me la ocazo foye plenigi restanta spaso por diverstemas comentos etp. Por ce esten ia convenso qe tius notos — cius eston foye ofisialas, alifoye personas — me scribadon en propra lingajo anstate en traditia Esperanto. Se tio ofendan al iu, tiu provizen indico pri sua contrastaro.

Me devun informi, comense, ce la laugranda modesteso de la nuna numero xuldizan al me,

e ne al s-ro Gunkel, ciu volin enmeti signife pli da materialo ol la nun aperigata. Me rezistin al la includo de 1) articolos de ne-membros, e de 2) pli ol unu articolo de la sama membro en unu numero. S-ro Gunkel consentin pri tius limigos, sed cun la recomendo ce los esten aperigitas en la organo ciel “oras principos”. A tiu recomendo me nun volonte plenuman. Ancore ne estan decido de la membraro pri tio, sed almene til tio ocazon (eventuale en la venonta vozdonon), la politico restan ce *NP* esten excludive membroforumo, cun maxime unu articolo de la sama membro en unu numero.

Pri la membros mem, vancam me joyan ce Novo ancore existan, me noljoyan raportu ce ne tre multas renovigin sua membros pos la risevo de la sepa numero. Sendin cotizo nur Wood, Stahl, Goeres, Kobelt, Alves Pinto kaj Navareño. Celcas alias estin jus avane cotizintas (o almene a tio pretendin), e estin ance ius el landos cun transpagas problemas. Pro tio e alio (e qar existan ius avanas membros a cius nos nepre volan reteni), la renovigita membrolisto aperon ne nun, sed nur en la venonta numero, ciu eston sendita nur al tius en la listo. Do, se tu volan resti novisto e ne estan yam scribinta al s-ro Gunkel (vd. lia nova adreso sur p. 66), nepre faren tio tuy. Lau la nuna plano, la venonta numero cun la nova listo aperon pos nur celcas monatos.

Pri la nuna financa stato de Novo, s-ro Gunkel sendin al me ege detala raporto en ciu li listigin omna germana marco (eq pfenigo!) risevita e elspezita en la ado de sia nova estreso. Yen nollonga eltirajo por comunicu al vos la caracteru de tiu raporto:

1994-08-04	k	letero al KOBELT	1,00 DEM	d
1994-08-08	k	100 blankaj, kunfenestraj kovertoj	7,29 DEM	d
1994-08-09	k	Walter KOBELT, SUI	10,00 DEM	k
1994-08-09	k	letero al GOERES	1,00 DEM	d

E simile plu. Me estin agrable surprizita de la zorga detaleso de tiu raporto, e imagan ce lo simile plezon al la alias. Lau la raporto, estin 85,27 DEM en la Novo-conto de Gunkel en Germanio, cio aldonizan al la avana UEA-conto novo-x. La prefero de Gunkel estan ce la du ade existen ciel sub-contos de tuta Novo-conto, e me vidan neni u cialo pro ciu ne esten tiele. Omnace, la detalos pri spezos reston laupete disponeblas al ayna interesito.

Roy MCCOY, Nederlando (ric. 1.1995)